



1(117)  
2010

# Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO  
Adreso por korespondi: ul. I.Krasickiego 18-20, PL 31-515 Kraków

Edwin de Kock

## Trokompreno

Nun la noktoj estas malfacilaj.  
Bruaj tagoj ree min trafluas,  
morna homtorento el la mondo.  
Vakaj ĉi vizaĝoj, vaka la horo,  
kaj la viv' tra terkribril' likiĝas  
dum l'argilon de la lanta urbo  
manoplenaj jaroj remuldadas.  
Mi bedaŭras pri la etaj agoj –  
am', laboroj kaj la birdpepado –,  
kiujn kun si solvas la momentoj.

La tempo nin mortigas ĉiuhore,  
kaj, amiko, malgraŭ ĉia ŝajno  
de la kontinuaj cerbobildoj,  
vi ne estas nune tiu sama  
kiu staris antaŭ la vespero  
ĉe la elirejo de la tago,  
aŭ la baraktito inter dormoj,  
noktomeze, en la songĝangalo.

Ekzistado estas propra perdo  
kiu sin detruas, por plukuri.  
Nia vivo estas la brulŝtofo  
de l' realo, aŭla brulo mem.  
Do la blanka lito jam ne logas,  
kaj la noktoj estas malfacilaj  
kiuj frustras: "Vivi estas morti."

## Malfacilo

Kokmaten' min krias, ruĝe, el la lito  
surpieden, temptretantan  
por taga pavimŝton' dekliva, glitigonta  
mensojn en mallumon lantan.  
Estas nia mond' poemo simbolista,  
Kies signifo tro subtilas.  
Kolizias la solidaj substantivoj  
kiuj kunpreninte ilas  
sen ligvortoj – agonij sencobreĉoj.  
Kromterminoj ne klarigas,  
kaj niaj vivoj mem – la ŝoke drastaj verboj –  
ĉion en la tempon ligas  
per malcertaj, cerbincitaj karnoplektoj.  
Ĉi komunikaĵo skiza  
penas en ĉio, trabalbutas nian sangon,  
igas ĉiun tagon kriza  
per peza kaj tenebra ŝarĝo de signifo  
mensorompe malfacila,  
kaj plandiras tra marĉ' de malkvietaj horoj  
post logo palpebrume brila.  
La malluma, variolvizaĝa luno,  
flegistin' de mia dormo,  
sin antiseptose klinas super mi. Enŝvebas  
nokto kvazaŭ kloroformo.

*Edwin de Kock*- naskiĝis 9-an de marto 1930 en Sud-Afriko. Li estas sudafrik-devena usona instruisto kaj profesoro kaj unu el la plej gravaj vivantaj Esperanto-poetoj. En Sud-Afriko li lernis Esperanton kaj verkis la unuan poemon (1955). Krom kiel originala poeto, li elpaŝis kiel biografo, esperantologo, poligloto, redaktoro kaj movadano. Li estas laika predikanto Adventista, misiisto, teologo, vegetarano kaj kontraŭrasisma aktivulo. Li estas membro de la Akademio de Esperanto ekde 1973, Honora Membro de UEA ekde 2000. Verkoj: „Ombroj de la kvara dimensio” (1961), „Fajro sur mia lango” (1967) „Poemaro kaj prozeroj” (1970), „Kvin elementoj” (1970). Sur la kampo de poezio li ellaboris teoriojn pri metriko, klarigitajn en la antaŭparolo de "Testamente" (2007). Per originalaj poemoj li kontribuis al multaj revuoj, antologioj kaj librokolektoj. Kiel esperantologo li i.a. kontribuis al la landnoma problemoj kaj pledis gardi la diakritajn literojn.

(Vikipedio)

## Krakova Societo ESPERANTO

### La programo de la renkontoj januare 2010

06.01	Renkonto kun <b>Volodimir Hordijenko</b> , ukraina esperantisto, organizanto de "Aroma Jalto"
13.01	<b>Lidia Ligęza, Grażyna Porada</b> - 10-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj (11-15.12.2009) 16:00 <b>Irena Urbańska</b> - Kristnaskaj kantoj 18:00
20.01	<b>Lidia Ligęza</b> - Pri miaj traduklaboroj por "Podlaĥia Antologio"
27.01	<b>Andrzej Feuer</b> - La novaj mnemoteknikaj versaĵetoj

### La sankta bonfaranto de Mira

Antaŭnomo *Mikolaj* devenas de greka *Nikólaos* kaj latina *Nicolaus*. Ĝi konsistas el partoj *nike-* venko kaj *laos-* popolo.

En Pollando ĝi estas uzata de la mezepoko en formoj *Mikolaj*, *Mikułaj*, *Nikolaj* (la orientaj terenoj), *Mikoł*, *Mikuł*, *Miklasz*, *Miszek* kaj dekelkaj aliaj. De ĉi antaŭnomo oni formis i.a. nomojn *Mikolajczyk*, *Mikolajski*, *Mikolajewski*, *Mikulec*, *Mikulski*, *Nikolski*, *Niklewicz*, *Kołakowski*.

Ĝiaj fremdlingvaj paralelaĵoj sonas: *Nicolaus* (lat.), *Nicholas*, *Nick*, *Nicky* (ang), *Nicolas*, *Colus* (fr.), *Nicola*, *Niccolo* (it.), *Николай*, *Николаша*, *Коля* (rus.)

Multaj sanktuloj (pli ol 20) kun tiu antaŭnomo aperas en la nomaro de la katolika eklezio. Pri la plej fama ni scias preskaŭ nenion. Li estis episkopo de la urbo Mira en Malgrand-Azio (nuna Turkio), en unua duono de la IV jarcento. Ĉio, kion pli poste oni pri li skribis, devenas de biografioj de aliaj personoj aŭ de belaj legendoj. Malgraŭ tio lia kulto en Mira kaj Konstantinoplo rapide ampleksis la tutan kristanan mondon. Kaŭzis tion tiaj motivoj kiel liberigo de tri maljuste arestitaj oficiroj, savo de la morto tri junajn kondamnitajn, savo de navigistoj de la mara katastrofo kaj precipe rakonto pri tri malriĉaj fraŭlinoj, al kiuj la sanktulo diskrete certigis rimedojn por dotoj, post kio ili jam sen obstakloj povis edziniĝi. En la 1087 restaĵojn de lia korpo oni el Azio transportis al Bari (Italio) pro la islama invadanto, kio firmigis lian kulton en la tuta Eŭropo. Precipe omaĝis lin Rutenio, kie de multegaj ikonoj li zorgis pri diversaj homaj aferoj kaj eĉ fariĝis la patrono de la lando. La same arde omaĝis lin Rusio. En la tuta Eŭropo lian ŝirmon petis la studanta junularo, infanoj, fraŭlinoj, navigistoj, panfaristoj, komercistoj kaj hansaj gildoj. De la XIII jarcento datiĝas kutimo disdoni stipendiojn kaj subvenciojn de S-ta Nikolao al lernantoj. En Pollando Sankta Nikolao estis patrono de infanoj, malliberuloj, kondamnitaj, navigistoj kaj fraŭlinoj dezirantaj edziniĝi. Krom tio li gardis bienojn kontraŭ tempesto kaj brutojn kontraŭ malsanoj kaj lupoj. Artisto Piotr Stachiewicz estas aŭtoro de la kristnaska bildkarto "S-ta Nikolao kaj lupoj". En la tenebra vintra pejzaĝo profile staras la sanktulo en la episkopa vesto kun pastoralo en la dekstra mano. Per la mano maldekstra li faras la regpovan geston ordonantan al grego de lupoj amasigitaj sub la horizonta arbaro resti surloke kaj ne invadi homajn sidejojn. Unusola hela kaj brila detalo de la bildo estas aŭreolo faranta la fonon por lia kapo, kio firmigas nekutiman etoson de la tuto.

La baza fragmento de la legendo – doto por tri malriĉaj fraŭlinoj en formo de tri buloj da oro havas konsekvencojn ĝis nun. En XVI j. privataj bonfarantoj kaj metiistaj korporacioj organizis monhelpon por malriĉaj fraŭlinoj kaj studentoj nomante ĉi fondaĵojn – de la S-ta Nikolao.

La sesan de decembro, dum tago al lia festo ne nur infanoj atendas liajn donacojn. Tradicio donaci al infanoj dezirantaj ludilojn kaj frandaĵojn en diversaj eŭropaj landoj datiĝas de XIX-a j. , en Nederlando eĉ de XVII-a j. Sed, bedaŭrinde , la noblan episkopon en eklezia vesto anstataŭis ĉie Sankta Klaus, superkreskinta koboldo en ruĝa, ridinda ĉapo kaj uniformo, kiu kun idiota ekkrio - ho, ho, ho ! forlasas jungitan en boacoj sledon glitiĝantan tra aero kaj trans kameno enpuŝiĝas al niaj domoj kaj al nia konscio. Kvankam li transportas pli kaj pli riĉajn donacojn (ne de Malgrand-

Azio, sed de subpolusa parto de Finnlando!) tamen, kie alvenas komerco, pereas estimo por pasinteco, digno kaj belo. La kontraŭkolda batalo, kiun entreprenis la katolikaj antaŭlernejoj kaj certaj preĝejoj dediĉitaj al Sankta Nikolao, kiel ekzemple paroĥio en Krzywiń precipe disvastiganta kulton de ĉi sanktulo, estas entute malbonŝanca...

*Lidia Ligeza*

## **Kasteloj kaj aliaj allogaĵoj de Germanio**

Unu el multaj personoj de kiuj la plej proksimaj familianoj forveturis por vivi eksterlande, estas ankaŭ mi. De pli ol dudek jaroj mia filo loĝas kaj laboras (havas propran firmaon) en Germanio. Tial okazas, ke mi estas ofta gasto de niaj okcidentaj najbaroj. La lastan aprilon kaj parton de majo mi estis gasto en tiu lando. Mi havis okazon rigardi kaj viziti multe da interesaj lokoj kaj objektoj, kiujn mi ofte kaj kun plezuro rememoras. Mi do decidis prezenti tiujn, kiuj influis al mi plej forte. Jen vojaĝante per aŭtomobilo mi vidis interesajn, kiun mi en Pollando ne rimarkis. Tuj malantaŭ la limo kaj poste interne de la lando staras altaj konstruaĵoj – ventmueliloj servantaj al produktado de elektra energio. Interesa vidindaĵo. Ankaŭ por atento meritas belegaj aŭtovojoj per kiuj mi vojaĝis tre komforte. Veturante direkten de Bavario oni renkontas grandegajn agrikulturajn terenojn sur kiuj kreskas lupolo uzata al produktado de biero. Ĉi tiu pejzaĝo aspektas tute alie ol en Pollando. Vojaĝante tamen per aviadilo ne eblas ne observi kaj admiri grandegan flughavenon en Munkeno, kie homo sentas sin tre malgranda. Ankaŭ urboj, kiuj mi vizitis faris al mi grandan impreson. Ĝenerale, ili estas puraj, domoj bele aspektas, ĉirkaŭ ili troviĝas multe da verdaĵo. En parkoj, sur skvaroj, sur ĉiuj liberaj pecoj da tero kreskas verdaĵo, pli malgrandaj domoj estas ĉirkaitaj per verda, alta kaj bele pritondita heĝo kaj interne kreskas multaj diversaj arboj, ornamaj arboj kaj floroj. Simila vido en nia lando ne ofte okazas.

Al pli grandaj urboj, kiujn mi vizitis apartenas: Munkeno kaj Nurenergo, al pli malgrandaj Dachau, Fistenfeldbruck, Olching kaj aliaj. Krom tio mi estis ankaŭ en la montaro Alpoj kaj vizitis pinton, kiu nomiĝas Zugspitze. Plej multaj interesaj lokoj mi vizitis en: Munkeno, Nurenbergo, Dachau kaj Alpoj.

En Munkeno mi vizitis: kastelon Nymphenburg, kiu troviĝas en okcidenta parto de la urbo, en granda, belega parko kun la malnova arbarejo. En XVII j. ĝi estis somera rezidejo de familio Wittelsbach, regantoj de Bavario. Parto de salonoj estas aranĝita en baroka stilo, aliaj partoj de rokoka kaj klasikisma stiloj. En 1747 oni fondis tie manufakturon produktantan porcelanon. Nune en la kastelo troviĝas kelkajn muzeojn, ekzemple princa stalo kun droŝkoj kaj muzeo de porcelano. Ĉi tiu kastelo estas tre vidinda.

Muzeo, kiu nomiĝas Deutsche Museum troviĝas ĉe rivero Isara trafluanta tra Munkeno. Ĉi tiu muzeo estis malfermita en 1925, havas ĉirkaŭ 28 000 eksponaĵoj dispartigitaj je 50 temaj sekcioj. Ĝi estas agnoskita kiel la plej granda teknika muzeo en la mondo. Ĝi posedas eksponaĵojn preskaŭ el ĉiuj branĉoj de la tekniko kaj industrio, inter alie: aviadilojn, boatojn, (ankaŭ submarajn) kaj aliajn. En la sekcio, kiu koncernas al aviadiltekniko, troviĝas multaj originalaj aviadiloj kaj inter ili fifamaj ĉasaviadiloj de firmao "Messerschmidt", partoprenantaj en la II-a mondmilito. Krom tio en la muzeo estas la astronomia observatorio kaj la planetario.

Kelkaj preĝejoj el kiuj specialan atenton meritas la preĝejo al sankta Jozefo troviĝanta en kvartalo Schwabing, ĉe Josephsplatz 1. En ĉi tiu preĝejo dum ĉiuj dimanĉoj kaj festoj celebrata estas sankta meso en pola lingvo, per pola pastro en asisto de polaj mesoservantoj, inter kiuj estas konato de mia filo- Józsek, kiu loĝis en Krosno. Dum ĉi tiuj mesoj ĉiam estas multaj kredantoj, tamen aliaj preĝejoj estas preskaŭ malplenaj.

Restoracioj kaj kafejoj en Munkeno estas abundaj. Specialan atenton meritas restoracio, kiu nomiĝas Hofbränkeller kaj troviĝas en la urbocentro. En ĉi tiu restoracio en 1919 Hitler

prelegis la unuan fojon , prezentinte sian libron "Mein Kampf". Ankaŭ ĉi tie oni povas ĉe granda, ligna tablo eltrinki unulitran glason da biero kaj manĝi bongustan porkan genuon. Estante en Munkeno oni ne povas ankaŭ ne viziti kafejojn en kiuj oni manĝas bongustajn kukojn, glaciaĵojn kaj trinki bonegan kafon kaj aliaj trinkaĵojn.

Esperanta klubejo troviĝas ĉe Schwanthalerstrasse 80, 80-336 München. En ĉi tiu klubejo, jaŭde je la 19:30 okazas renkontoj. Mi ankoraŭ ne vizitis la klubejon, sed dum la plej proksima okazo mi intencas eniri ĝin. Telefona numero el Pollando estas (0049) 89686995.

Estante en Munkeno aŭtune ne eblas ne partopreni en bierrikoltfestoj, kiu nomiĝas Oktoberfest. Ĝi estas la plej granda popola festo en la mondo. Ĝi estas celebrata de 12.10. 1810 kaj organizata ĉiujare inter septembro kaj oktobro kaj daŭras ĉirkaŭ 16 tagojn sur la placo, kiu ampleksas 420 000 kvadrataj metroj kaj nomiĝas Theresienwiese. En festeno partoprenas homoj el la tuta mondo, eltrinkante gigantan kvanton da biero, amuziĝante ĉe laŭta muziko kaj fordiboĉante milionoj da eŭroj. Lastatempe dum Oktoberfest partoprenis ĉirkaŭ 6 milionoj da homoj, kiuj eltrinkis ĉirkaŭ 5 milionoj litroj da biero kaj elspezis ĉirkaŭ unu miliardon da eŭroj.

La dua granda urbo en Bavario, kiun mi vizitis estas Nurenbergo, fora de Munkeno ĉirkaŭ 150 km. Loĝas tie ĉirkaŭ 500 000 homoj. Ĝi estas ĉefurbo de Frankonio. Super la urbo regas la monumenta kastelo- komplekso de 3 konstruaĵoj: kastelo imperiestra, kastelo estra kaj kastelo urba. Situo de la kastelo iom similas kaj rememorigas krakovan Wawel-on. Nurenbergon ĉirkaŭas la fortifikaĵo kun kelkaj turoj. Sur la malnova urboplaco suprenleviĝas renesanca urbodomo devenanta de XIV-XVII j. Apude troviĝas 19 m alta malfrugotika puto en formo de turo, kun figuroj de Maria, Apostoloj kaj Profetoj. Proksime staras 2 gotikaj sanktejoj. Precipe preĝejo al sankta Sebald forte impresas. Konstruita inter 1230- 1273 kun la monumenta tombo de la sankteja patrono kaj multaj skulptaĵoj, ankaŭ faritaj de Veit Stoss (Wit Stwos) postrestis forte en mia memoro.

Ĉirkaŭ 20 km norden de Munkeno troviĝas la ekskoncentrejo Dachau- en kiu inter 1933 - 1945 funkciis unu el la plej teruraj hitleranaj turmentejoj. Pereis tie fare de germanaj nazioj ĉirkaŭ 43 mil homoj. Nune estas tie la muzeo, kiun vizitas jare 800 000 homoj el la tuta mondo. Ĉi tiu loko ege min deprimis.

Unu el la plej interesaj kaj neforgeseblaj lokoj , kiuj mi vizitis en Germanio estas montaro Alpoj kaj speciale montopinto nomiĝanta Zugspitze. Alpoj komenciĝas ĉirkaŭ 100 km de Munkeno kaj Zugspitze estas la plej alta pinto en tiu lando- havas 2.962 m de alteco. Ĝi troviĝas en la montara ĉeno de Tivolaj- Bavariaj kalciaj Alpoj, ĉe germana- aŭstria limo. Sur la pinton oni povas veturi per telfera trajno aŭ per dentorela fervojo, kies linio gvidas tra elkavigita interne de la monto, tunelo. Sur altebenaĵo de Zugspitze troviĝas pli alta, situata sur glaciejo unua en Germanio skicentrejo. Krom ĝi funkcias tie la Rifugejo de Munkena Alpa Asocio, konstruita antaŭ 100 jaroj, la Meteorologia Stacio kaj ankaŭ restoracio kun bela teraso, kie oni povas bonguste manĝi kaj varmigi en la suno. La pinto estas vizitebla kaj vizitinda por turistoj. Resume: mi ne povas elekti, ĉu pli impresis min la montaro kaj bela naturo aŭ grandiozaj konstruaĵoj faritaj de la homo.

*Stanisława Szostak*

